

Kunlaboro inter UEA kaj SAT, *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*  
Rapida priskribo

Claude Gacond, 362-a radioprelego, 1970.09.16 & 19

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni legis al vi kelkajn eroj el la bela festparolado, kiun D-ro Ivo Lapenna prononcis dum la inaŭgura kunveno de la Universala Kongreso en Vieno. Vi eble ankoraŭ havas en la memoro la lastajn parolojn de la UEA-prezidanto, kiujn ni legis :

A.- « *Ni ĉiuj kaj ĉiuj niaj organizaĵoj devas maksimume intensigi la klopodojn [por diskonigi esperanton], utiligante plej racie la disponeblajn homajn fortojn kaj financajn rimedojn.* »

Cl.- Tiuj paroloj estas alvoko al kunlaboro. Tiun ĉi someron la prezidanto de UEA ne nur kontentiĝis prediki la kunlaboron per belaj vortoj. Li agis en tiun direkton partoprenante la kongreson de SAT kaj prelegante en ĝi. Ni salutas tiun iniciaton kun multe da ĝojo, kaj vidas en ĝi gravan eventon. Tro longe UEA kaj SAT iom sekteme konkurencis sin reciproke. Kiel membro de ambaŭ asocioj mi estas ege kontenta vidi, ke kunlaboro eble anstataŭos tiun konkurencemon.

A.- Tiu kunlaboro komenciĝis antaŭ kelkaj jaroj. La iniciato de la Plenum-komitato de SAT eldoni novan vortaron grandparte sukcesis pro la tuja apogo de la gvidantoj de UEA.

Cl.- Kaj la apero de tiu *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*, ĵus antaŭ la kongresa sezono de tiu ĉi somero, certe signifos por nia movado grandan paŝon antaŭen, kiel la apero de la *Plena Vortaro de Esperanto* en 1930, do ĵus antaŭ 40 jaroj, markis decidigan etapon en la historio de nia movado.

A.- En 1930 multaj esperantistoj bedaŭris, ke la *Plena Vortaro* ne estis pli plena. Hodiaŭ ili eble bedaŭros, ke la *Plena Ilustrita Vortaro* ne estas pli ilustrita. Fakte la ilustraĵoj nur troviĝas fine de la librego en parto titolita **Tabeloj kaj Ilustraĵoj**.

Cl.- Koncerne al la pleneco, ni opinias, ke la esperantistoj ne plu sentos tro da mankoj. Apud la komunaj vortoj, kiuj estas multe pli abundaj, ol en la *Plena Vortaro* de 1930, estis registritaj multaj propraj nomoj pri geografio, mitologio, historio kaj scienco. Al la uzantoj de tiu vortaro nun la laboro vastskale eksperimenti la proponitajn formojn, kaj post 40 jaroj, vortaro tiam vere ilustrita kaj ankoraŭ pli plena permesos vidi, kien iris la evoluo koncerne al la propraj nomoj.

A.- La grupigo de la bildoj en 30 platoj precize desegnitaj de sinjorino E. Støp-Bowitz faciligos la asimiladon de faka vortaro. Mi vidas la esperanto-grupojn uzi tiujn platojn por vort-konkursoj, kaj la kursojn por lernado de la sciencaj terminoj.

Cl.- Rigardante tiujn platojn ni konstatas, ke ili pritraktas la ĉefajn branĉojn de la homaj konoj.

A.- Sur la unua plato dediĉita al historia geologio kaj paleontologio 52 bestoj situas laŭ la dato de sia apero en la historio de nia planedo.

Cl.- Sep platoj estas poste dediĉitaj al botaniko. Jen iliaj temoj : folioj ; infloreskoj ; floroj kaj fruktoj ; anatomio kaj morfologio de plantoj ; arboj ; cerealoj.

A.- Ses platoj estas poste dediĉitaj al zoologio. Per ili oni intimiĝas kun la nomenklaturado, kiu koncernas la mamulojn, birdojn, rampulojn kaj amfibiojn, la fiŝojn, senkranulojn kaj tunikulojn, la artikulojn kaj diversajn senvertebrulojn.

Cl.- Tri platoj estas poste dediĉitaj al la homa anatomio. Ili donas la nomenklaturon pri la skeleto kaj korpo, pri la aparatoj kaj kanaloj, pri la okulo, orelo kaj nazo.

A.- Sekvas plato dediĉita al geometrio, trigonometrio kaj stereometrio.

Kunlaboro inter UEA kaj SAT, *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*  
Rapida priskribo

Claude Gacond, 362-a radioprelego, 1970.09.16 & 19

Cl.- Arkitekturo okupas du platojn. En ili ni konstatas, ke la eŭropaj stiloj kaj formoj, monumentoj kaj preĝejoj ankoraŭ okupas la ĉefan lokon.

A.- Laboriloj kaj mezurinstrumentoj havas por si unu platon. Estas iomete malmulte, sed ni devas agnoski, ke ĝis nun esperanto ne estis tre uzata en metiaj medioj.

Cl.- Optiko havas sian platon.

A.- Same meĥaniko.

Cl.- La plato pri armiloj ankaŭ pruvas, ke esperanto ne estis tre uzata en militistaj medioj. Oni ĉefe vidas bildojn de nemodernaj armiloj.

A.- Plato pri muzikiloj ankaŭ montras, ke esperanto restis ĉefe okcidenta lingvo.

Cl.- En la plato pri vestoj ni vidas aperi multaj neokcidentaj radikoj.

A.- Fine kvar platoj prezentas veturilojn. Ĝenerala plato instruas la vortaron, kiu koncernas plej diversajn veturilojn. Poste aŭtomobilo, flugmaŝinoj kaj ŝipoj ricevas po unu platon.

Cl.- Indekso donas la liston de la vortoj bildigitaj. En la vortara parto de la volumo nenio indikas, ĉu vorto estas bildigita aŭ ne.

A.- Antaŭ la ilustraĵoj troviĝas tabeloj, kiuj estas bonvenaj. Ili donas liston de mallongigoj ĝenerale uzataj kaj liston de mallongigoj de societoj. Por ni esperantistoj tiu listo estos tre utila.

Cl.- Sekvas tabelo kun la simboloj de aŭtomobila nacieco. Tiujn simbolojn oni pli kaj pli uzas en la internaciaj kongresoj por indiki la nacian devenon de la partoprenantoj.

A.- Sekvas tabelo, kiu donas mallongigojn, kiuj estas propraj al medicino kaj biologio.

Cl.- Poste troviĝas tabeloj por la scienca nomenklature. Je iliaj temoj : geologiaj tempoj, taksonomiaj unuoj de botaniko ; ĉefaj sistematikaj kategorioj kaj sistematikaj grupoj en zoologio kaj la prahistoriaj kulturperiodoj.

A.- La 1300 paĝoj de tiu nova vortaro ne redaktiĝis de si mem. Ili estas la frukto de longjara kunlaboro, kiun direktis profesoro Gaston Waringhien, la prezidanto de la Akademio de Esperanto, kaj kiun administris Lucien Bannier, la prezidanto de SAT. La antaŭparolo de tiu vortaro alportas interesan raporton pri tiu kunlaboro. La venontan semajnon ni legos al vi erojn el tiu interesa historio de la *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-